Raporto: Varbado per sociaj retoj

Castione della Presolana, 2017.04.16, trejnistoj: Carlos, Léon, Tomáš

Enkonduko

Tiu ĉi dokumento estas raporto pri la trejnado „Varbado per sociaj retoj”, kiu okazis la 16-an de aprilo 2017 en Castione della Presolana dum IJF, kiel parto de la projekto Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo.

Celoj de la trejnado

1. Partoprenantoj scipovos dividi sociajn retojn laŭ diversaj kriterioj kaj komprenos la diversajn funkciojn de pluraj sociaj retoj.
2. Partoprenantoj konscios ke ekzistas multe da sociaj retoj kaj se ni volas atingi pli da homoj ni bezonas uzi pli da sociaj retoj ol unu.
3. Partoprenantoj scipovos dividi kaj uzi diversajn varbmaterialojn kaj ĉefe, kie oni uzos diversajn materialojn.

Ŝlosilvortoj

Socia retoj, varbado, varbmaterialoj, merkatiko

Partoprenantoj de la trejnado

11 personoj, de diversaj landoj, en diversaj aĝoj, partoprenantoj de Interancia Junulara Festivalo

Trejnistoj

Carlos Pesquera Alonso, Léon Kamenický, Tomáš Stano

Bezonataĵoj

Glubendo, tabulkomputilo (anstataŭigebla per 8 paperoj DIN-A4), 8 paperoj blankaj DIN-A4, 5 paperoj koloraj DIN-A4, 3 papero DIN-A3, 9 papero DIN-A1, po 8

glupaperetoj por ĉiu partoprenanto, po 1 skribilo por ĉiu partoprenanto, 4 tabloj, po 1 seĝo por ĉiu partoprenanto, 1 ĉambro.

Skemo de trejnado

Horo	Daŭro	Temo	Priskribo
10:30	0:02	Bonvenigo	Sinprezento, prezento de agendo
10:32	0:05		
10:37	0:10	Interkonaj ludoj	
10:47		**Sociaj retoj**	
10:47	0:12	Pluraj sociaj retoj	Montri ke ne ĉiuj uzas la saman socian reton
10:59	0:30	Diversaj celgrupoj	Laborgrupoj - Diversaj celgrupoj (neesperantistoj, esperantistoj, aktivuloj) - kion ni devas fari/kiu speco de varbado i devas uzi por kapti ilia atento
11:29	0:05	**Konsciigo pri ekzisto de pluraj kanaloj por varbi**	
11:34	0:10	Statistikaj teoriludoj	La plej uzataj socia retoj (laŭ nombro de uzantoj kaj laŭ la teritorio)
11:44	0:05	Malpermesataj sociaj retoj	Priparolado kaj prezento de mapo kun malpermesataj sociaj retoj
11:49	0:05	Mastrumado de pluraj sociaj retoj	Uzado de diversaj aplikaĵoj por mastrumi pliaj sociaj retoj
11:54	0:07	Neregistaraj organizoj kaj sociaj retoj	Kial neregistaraj organizoj uzas sociajn retojn - ludo (la plej markitaj respondoj de reserĉo)
12:01	0:05	Diskuto kaj resumo	
12:06	0:25		Kafopaŭzo
12:31		**Diversaj varmaterialoj**	
12:31	0:05	Energiludo	Zipzapzum
12:36	0:15	Diversaj specoj de varmaterialoj	Parolado kaj pripensado pri la temo
12:51	0:20	Etiko kaj merkatiko	Kreado de listo de reguloj en laborgrupoj kiam oni supozas ke oni devas sekvi kiam publikante varbmaterialon
13:11	0:07	Konkludo	
13:18	0:05	Resumo kaj retrokuplo	
13:23	0:07		

Detaloj de la trejnado

Bonvenigo

Ni prezentis nin kaj la temon de la trejnado. Ni demandis ĉu la partoprenantoj respondecas de iu sociaj retoj de iu E-organizo kaj pendigis la tagordon de la trejnado. Poste ni klarigis la ludeton *fruktosalato* kaj petis volontulon por resumi la trejnadon je la fino.

Pluraj sociaj retoj

Ĉi tiu unua parto de la trejnado temas pri la demandoj “kiu uzas kiujn sociajn retojn?” kaj “kion oni konigas je sociaj retoj?”. La trejnitoj devos kompreni ke ekzistas pluraj sociaj retoj kaj scii kion ili devas afiŝi je kiuj sociaj retoj.
Unue ni komencis per teorialudo. DIN-A1 8 pentrodividita estis pendigita de la muro. En ĉiu kvarangulo estis la una litero de la logoo de iu socia reto (Youtube, LinkedIn, Facebook, Couchsurfing, Tinder, Twitter, Ipernity kaj Google+). Ni estis du helpantoj kaj la trejnisto. La helpantoj donis po 8 glupaperetoj por partoprenantoj dum la trejnisto enkondukis la temon parolante pri “kio estas sociaj retoj?”. La trejnisto klarigis ke kiam oni pensas pri tiu demando oni rimarkas ke la celoj de tia ilo dependas de la specifaj rimedoj kaj ebloj de ĉiu socia reto. Tial la trejnisto klarigis ke ni uzos tablokomputilon por montri kelkajn logoojn. La partoprenantoj devis glui la glupaperetojn al la paperego se ili havis konton en tiu socia reto aŭ ne. Tiel la partoprenantoj vidis la diversecon inter sociaj retoj kaj sian nekonon.

Diversaj celgrupoj

La partoprenantoj estis dividotaj en tri grupoj de eblaj divido en la reto: Esperantistoj, virtuala Esperantistoj kaj aktivuloj [Esperantistaj retaj]. Sia celo estis diskuti pri kiujn afiŝojn ĉiu grupo preferas trovi rete. Post tio, ili kunigis kaj rezumi siajn diskutojn. La trejnisto tiam montris ke oni povas vidi ke kelkaj ideoj interplektas kaj ke se ni uzus alian kategorian dividon, simile okazos. La partoprenantoj komprenis ke ĉiu publiko estas malsimpla ĉar la homoj apartenas al multaj grupoj samtempe.

Trie ni uzis fruktosalaton antaŭ komenci la sekvonta parto de la trejnado. Tamen mankis tempo. Tial ni devis konsileti pri kutimaj eraroj, pri kiel reagi antaŭ kvereloj, klare scii kaj ne forgesi la celojn, pripensi eblajn reagojn aŭ ŝajni pli granda kaj kompreni la statistikojn.

Statistikaj teoriludoj - diversaj sociaj retoj

Por ke statistiko ne estu ĉiam tiel “malamuze” montrata ni decidis dividi niajn partoprenintojn en diversaj grupoj kun malsama nombro por montri unue la 5 plej uzataj sociaj retoj en la mondo (Facebook, WhatsApp, QZone, QQ, WeChat) kaj poste ni dividis la homojn laŭ 5 sociaj retoj laŭ grandeco de teritorio en kiu ili estas plej uzataj (Facebook, V Kontakte, QZone, Facenama, Odnoklassniki). La trejnitoj povis observi ke kelkaj el ili ŝanĝis kaj ankaŭ la nombro de homoj en diversaj grupoj estis malsamaj. Ili ĉiam estis memkompreneble unue demanditaj laŭ kiu kriterio ili opinias ke estas dividitaj, havante en manoj paperetojn kun diversaj simboloj de sociaj retoj, kiun estis antaŭe hazarde dividitaj. Starante en la diversaj grupoj oni ankaŭ havis agrablan diskuton pri ilia uzado (ĉar kelkaj partoprenantoj ne konis kelkaj el ili) kaj ni fakte povis profiti de tio ke la grupo estis kreita de homoj de diversaj mondpartoj do ili povis mem klarigi pri la sociaj retoj unu al la alia.

Aldonaĵo 1: Bazaj informoj pri sociaj retoj menciitaj en la statistikludoj

Malpermesataj sociaj retoj

Estas ankaŭ alia kialo kiu tre gravas ke oni memoru pri ĝi kiam parolante pri uzado de pluraj sociaj retoj. Temas pri la fakto, ke en kelkaj landoj en la mondo estas la plej

uzataj sociaj retoj malpermesataj. Oni diskutis pri tiuj aferoj kiam ankoraŭ oni staris en grupoj laŭ la statistikoj de antaŭa parto kaj simple demandis ilin kiel ilia informo povus atingi ilian imaginaran amikinon de Ĉinio kiun ili ege volas ke ŝi partoprenu vian esperantan eventon en la lando (Kiun socian reton uzi? Ĉu publikigi videon?). Poste, por plifaciligi la diskuton, ni pretigis mapon kien oni povis vidi pli facile kie Facebook, Twitter kaj YouTube malpermesitaj. Oni ankaŭ mallonge parolis pri la motivoj kial la registaroj malpermesas ilin (ekzemple: politika situacio, problemo estas enhavo,...).

Neregistaraj organizoj kaj sociaj retoj

Uzante datumojn de esploro ni kreis du teamojn kiuj devis ordigi laŭ frekvento plej rapide eble respondojn al la demnado: “Kial via neregistara organizo uzas sociajn retojn?” Ambaŭ teamoj sufiĉe rapide ordigi kaj ankaŭ sukcesis interkonsenti kaj fari rangliston de la plej kutima respondo ĝis malplej. Poste, ni kune trapasis iliajn rezultojn kaj eksciis ke ambaŭ grupoj faris etajn erarojn, tamen estis sufiĉe similaj al la oficiala rezulto. Tio povis ankaŭ okazi, ĉar trejnadon partoprenis ankaŭ homoj kiuj mem mastrumas iun socian reton por ilia organizo, pro tio ofte estis interesa observi la diskutojn kiam la trejnitoj inter ili kundividis siajn bonajn praktikojn.



Mastrumado de pluraj sociaj retoj samtempe

Se oni jam konscias ke oni bezonas pro diversaj kialoj agi en pluraj sociaj retoj , oni ankaŭ devas scii kiel plej efike tion fari. Bonŝance, estas retaj apoj kiuj helpadas mastrumi plurajn sociajn retojn samtempe. Tiuj apoj krom tio ankaŭ ebligas la mastrumistojn de sociaj retoj vidi raportojn kaj statistikojn surbaze de diversaj kriterioj. Hootsuite, estas unu el la plej uzataj, ĉar eblas havi senpagan planon kiu ebligas mastrumi 3 sociajn retojn samtempe. Kio fakte signifas la vorto “mastrumi” pli precize, se parolante pri sociaj retoj? Ĉefe temas, pri antaŭplanado de kiam, kiu varbmaterialo estu publikigita (gravas ekzemple por atingi iun specifan grupon de homojn - ekzemple grupo da homoj kiu plej verŝajne kontribuos en mondonackampajnoj).

Diversaj specoj de varbmaterialoj

Ordigo de diversaj specoj de varbmaterialoj laŭ uzado ĉe sociaj retoj. Montrado de ĉefaj celoj de varbmaterialoj (al kio ili celas) kaj ankaŭ sociaj retoj, en kiuj ili estas la plej uzataj. Ekzistas pli da specoj de varbmaterialoj kaj ni priparolis 4 la plej uzataj.

<u>Videoj</u>

La plej uzata varbmaterialo estas video. Ĝia ĉefa celo estas amuziĝi, sed ankaŭ prezenti ideon de reklamata afero. Aliaj celoj estas efika vendado (povas bone klarigi

pri la afero mem ekz. avantaĝoj/malavantaĝoj) kaj konscio pri la temo. Videoj estas la plej uzataj ĉe sociaj retoj kiel Youtube, Facebook aŭ WhatsApp.

Fotoj

La dua plej uzata varbamaterialo estas foto. Ĝia ĉefa celo estas diri rakonton (pro tio fotoj ĉiam devus esti plenaj de emocioj). Fotoj ankaŭ devus krei opiniojn pri la temo kaj ankaŭ engaĝiĝi homoj paroli pri la temo kaj fari ion por plibonigi situacion. Fotoj estas ĉefe uzataj ĉe Instagram, Facebook kaj Snapchat.

Artikoloj

Sekva varbmaterialo estas artikolo. Ĝia kerna celo estas plialtigi nombron de interesiĝantoj pri la afero kaj ankaŭ konscii pri la temo. Per la artikolo ni povas atingi grandan publikon kaj tiu ĉi varbmaterialo estas preskaŭ ĉiam konektata kun la ligilo (pro ĝia grandeco) kaj kun alaj varbmaterialoj (ekz. foto aŭ afiŝo). Artikoloj estas ĉefe uzataj ĉe Facebook kaj Google+.

Afiŝetoj

La lasta varbmaterialo estas afiŝeto. Ĝia ĉefa celo estas kapti atenton de la homoj kaj konvinki ilin, por ke ili engaĝiĝu. Alia celo estas ankaŭ prezento de la ideo. Afiŝetoj ni uzas ĉefe ĉe Facebook, Twitter aŭ LinkedIn.

Etiko kaj merkatiko

Dum la publikado de varbmaterialoj estas grave sekvi kelkajn regulojn. En ĉiu lando ekzistas kodekso aŭ leĝaro, kiuj enhavas regulojn pri etiko ĉe varbado kaj reklamado. Pere de laborgrupoj ni kreis liston de reguloj. Unue ni dividis grupon al 4 malgrandaj grupoj (afiŝeto, artikolo, foto, video) kaj en ĉiu grupo oni devis enskribi, kion ni povas aŭ ne povas fari kiam ni publikigas varbmaterialon.

Poste ni kunigis grupojn de video kaj foto (pro multe da komunaĵoj) kaj grupojn de artikolo kaj afiŝeto (ankaŭ estas pli similaj kune ol kun la aliaj varbmaterialoj). Homoj en grupoj kunigis similaĵojn kaj malsimilaĵojn al unu papero kaj poste prezentis ilin.
Dank al tiuj ĉi similaĵoj ni kreis liston de reguloj, kiun ni devas sekvi kiam ni publikigas varbamaterialon kaj ni vidis ke estas pli malpli simila kun etikaj kodeksoj de diversaj landoj.

Aldonaĵo 1: Informoj pri sociaj retoj menciitaj en “statistikludoj”

Facebook (esperante: vizaĝlibro)

- Interkona retejo lanĉita la 4-an de februaro 2004
- (rimarko: ĉi tiu socia reto estis jam prezentita en antaŭa bloko, do ni strebos observi ĉu ĉiuj partoprenatoj bone memoris ĝin)
- ttt-paĝo de la socia reto: www.facebook.com

Qzone

- Lanĉita en 2005
- La enhavo estas ĉefe blogoj, videoj, muziko kaj eblo sendi fotojn
- Apartenas al ĉina kompanio Tencent
- ttt-paĝo de la socia reto: www.qzone.qq.com

QQ

- Malnova versio de ICQ (trejnisto demandas ĉu trejnotoj memoras tiun ĉi apon (rimarko: dependas de kiam ili fakte komencis esti aktivaj en sociaj retoj) – ia speca tujmesaĝilo
- Apartenas al la Ĉina enterpreno Tencent
- Plej uzata kaj fama social reto en Ĉinio
- ttt-paĝo de la socia reto: www.qq.com

WhatsApp (esperante: Vacapo)

- Estas senpaga plursistema tujmesaĝilo por saĝtelefonoj
- Oni povas kundividi bildojn, filmetojn, kaj aŭdivideaĵojn
- Apartenas al la enterpreno Facebook ekde 2014
- Interesa krominformo: la Androida kliento kreis Telegramon en 2015
- ttt-paĝo de la socia reto: https://web.whatsapp.com/

We Chat

- Lanĉita en 2011
- Apartenas al la Ĉina enterpreno Tencent
- Iu pli moderna tujmesaĝilo, fondita por eliri ĉinan merkaton = fine, ne sukcesis
- ttt-paĝo de la socia reto: https://www.wechat.com/

V Kontakte

- Plej granda Eŭropa socia reto - uzata ĉefe en Rusio
- Funkcias same kiel Facebook
- ttt-paĝo de la socia reto: https://vk.com/

Odnoklassniniki

- Estas socia reto por “samklasĉambranoj” de lernejo (oni ankaŭ uzas ĝin por komunikado inter gepatroj de la “samklasĉambranoj” kaj instruistoj pri rezultoj, problemoj, ktp.)
- ttt-paĝo de la socia reto: https://ok.ru/

Resumo kaj retrokuplo

Ni komencis la lastan parton petante al nia volontulo rezumi la trejnadon. Post sia resumo, ni plibonigis kelkajn punktojn kaj memorigis al la partoprenantoj la ĉefajn celojn de la trejnadon.
Post fini kaj danki la partopreno de la partoprenintoj, ni petis al ili retrokuplon. Ni uzis la retrokuplan demandaron de la projekto kaj kartonan skatolon por kolekti ilin. Ni ricevis 8 respondojn, unu el ili, anstataŭ sekvi la demandaran metodon, estis du paĝa komento.

Retrokuplo

La demandaro enhavis 24 demandojn inter kiuj 16 estis kvanteblaj demandoj. Jen ni prezentas la averaĝan rezulton.

Mi akiris novajn konojn dum la trejnado	4,14
Mi akiris kompetentojn kiujn mi uzos estontece	3,86
Mi reviziis kaj plibonigis kompetentojn kiujn mi jam havis	4,14
La proponitaj ekzercoj estis novaj por mi	4,00
Mi trovis efikaj la proponitajn ekzercojn	4,43
Tio kion mi lernis dum ĉi tiu trejnado utilas por mia agado	4,43
La celoj de la trejnado estis klaraj	4,71
La nivelo de la trejnado estis je miaj atendoj	4,71
La trejnistroj bone konas la temon	4,71
La trejnistroj prezentis la temojn klare kaj kompreneble	4,57
La trejnistroj scipovis engaĝi ĉiujn dum la tuta trejnado	5,00
orio kaj praktiko	4,71
La trejnistoj bone respondis taŭge la demandojn	4,86
La facileco de trejnado estis (1 tro malfaila tro facila)	4,00
La ritmo de la trejnado estis taŭga (1 tro rapida tro malrapida)	4,00
Ĝenerala impreso de la trejnado	4,71

Ĉiuj partoprenintoj kiuj respondis opiniis ke ili konsilus pri la trejnado al amikoj kaj estis kontenta kun la resulto. Jen ni montras la nekvanteblajn respondojn krom la nomoj de la respondintoj:

Kiom kontenta vi estas pri la enhavo?
Kontenta
Tre kontenta
Sufiĉe, mi timis enui sed ĝi estis pli interaga ol mi atendis
5/5
Multe
Mi jam sciis pri multaj aferoj. Tamen la enhavo estis bona kaj interesa
La enhavo estis ammuza kaj interesa

Kiom kontenta vi estas pri la trejnistoj?
Kontentega
Vigligaj kaj klare parolis kaj pridiskutis
Simpatiaj
5/5
Bona prezento
Viglaj ka klaraj sed foje ne parolis klare
Trejnistoj bone klarigas ĉion

Kiom kontenta vi estas pri la medio?
Kiel ĉiam
-
Bona, belaj afiŝoj
Bone
Tre agrabla
Ĉambro, eĥo. Ĝenerale tre bona kaj interaga

-

Kion vi sugestas por plibonigi la sesion?
-
Pliaj detaloj, sed eble estus tro longa. dua parto estus bone se la medio/renkontiĝo permesas
-
Nenio,por mi, ĉio enordas
Ne glui la novajn paperojn sur por malnovaj
Pli da praktikaj aktivaĵoj, kreado de afiŝoj. Traktado pri la enhavo de la afiŝoj mem
-

Kiuj estas viaj personaj kernaj lernaĵoj el ĉi tiu sesio?	Kial?
-	-
Malsamaj retoj permesitaj/blokitaj tra la mondo	Pli klarigas kiel fariĝi pli efika rekte
Mi eksciis pri ekzisto de kelkaj sociaj retoj	Estas bona superrigardo pri la temo
Ekzisto de multaj sociaj retoj	Interesa
Kiel uzi la reto por nia evento	Tre interesa
Pri kiuj retejoj gravas kaj kie	Eĉ por mezspertaj homoj estas multo por lerni kaj estis amuze.
-	Por tio ke la trejnado estas vigla kaj amuza

Mi tre ŝatis, gratulon! ♡

- en la tagordo mankis kafopaŭzo (ĝi ne estis skribita tie)
- interkona ludo: estis iomete konfuzita la klarigo, helpus se vi: – pretigus la precizan vortumon antaŭe
  – tiuj kiuj konas (la trejnistoj) komencu por doni ekzemplon al aliaj
- kial oni ricevis 10 paperetojn se estas nur 8 sociaj retoj? Sed tio ne tro gravas ☺
- unu el la partoprenantoj demandis pri ĉu oni preferas havi fermitan aŭ malfermitan grupon en FB por sia E-organizo: ĉi tio ŝajne estas bona temo por diskuti, do eble memorv tion kaj eventuale uzpovas uzi tion en iu estonta trejnado.
- kiam ni dividiĝis al 3 grupoj (neesperantistoj, aktivuloj, observantoj), tre helpus se oni skribus la DIFINOJN kaj la DEMANDON sur papero. Oni pli frue komprenus la taskon.
  ↳ krome, tiuj grupoj bonege funkciis ♡
- mi ege ŝatis kiam Léon petis 2 homojn prezenti siajn najbarojn post fruktosalato, bonega ideo
- kiam Léon parolis pri la ekzemplo de ĉinoj kaj diris "Lin Ĉin Pin aŭ io ajn", tio povas esti interpretita kiel ofenda / rasisma, krom kiam oni scias ke vi ne celis tion. Bona solvo estus anstataŭ tio diri ekzemple "Juliana" aŭ alia homo kiu en tiu momento tenis la papereton de Q zone, ĉar tam tiu homo kvazaŭ rolludas ke vi estas ĉino.

- por la tasko kiam necesas ordigi la kialojn kial organizoj uzas soc. retojn vi bezonas havi 2 paperojn kun priskribo de la tasko, kaj 2 trejnistojn kiuj ĉiu kun sia papero iras al unu el la grupoj
- kiam vi diris al Arina ke ri povas konfirmi ke Whatsapp estas plej uzata en Afriko, tio ne estis tiom bone, ĉar estis iu privata ŝerco. Prefere vi devintus demandi al la du ĉeestantaj afrikanoj. Se mi estus en ilia loko, mi sentus min ellasita. :(
- en la listo de celoj de videoj/fotoj/afiŝetoj/artikoloj, la celoj estis ek. "amuzo", "prezenti" ktp. Estus pli bone se aŭ ĉiuj estus verboj, aŭ ĉiuj estus substantivoj.
- mi ege ŝatis la lastan ekzercon kiam oni unue pardis en duopoj kaj poste en kvaropoj – perfekta siuŝelvo!
- kelkaj lingvaj aferoj:
  - ag~~e~~ndo → tagordo
  - re~~s~~erĉo → esplono/esplorado
  - pu~~n~~kto → poento
  - publ~~i~~kante → publikigante

Pardonu, sur ĉitiu papero estas nur konsiloj por plibonigo kaj ne la aferoj kiuj jam estis perfektaj. Sed mi estis engaĝita la tutan tempon, eĉ sekundon ne envis. Vi ĉiuj prezentis ege bone. Dankon!